

(1949)

V-20724/1

USONA



REVUO

U. S. of N. A.

COPYRIGHT

REVUE

No. 1

Milwaukee, Wis., U.S.A.

Septembro, 1949

DEDICITA AL INTERNACIA KUNLABORO PER ESPERANTO

DEVOTED TO INTERNATIONAL COOPERATION THROUGH ESPERANTO

TO OUR READERS

This modest publication will be read by people of all nations in every civilized corner on earth. It is an international paper for an international reading public in the international language. The English content of the paper is primarily for the benefit and information of the American reading public.

At this first printing, this publication does not compare either in scope or in its general appearance with the splendid Esperanto newspapers and magazines printed in the less fortunate countries of Europe. However, it is our purpose, our aim and our hope to be able in time to publish the first magazine in the international language in America which will demonstrate this nation's abilities and proprieties.

In today's world of radio, television, supersonic travel and atomic energy, this American interlanguage paper will play a tremendous role in international business and human relations. It is our hope that it will be a media for promoting human understanding throughout the world. It also offers American business enterprise an important carrier for worldwide advertising of their products and services. It should; it must; and it will . . . reveal democracy and freedoms of business and humanity.

It is our aim and purpose to tell the world in the neutral, common universal language — without daunting any individual's national pride — not only of the American will to work and help build free peoples in free lands, but also to tell the peoples of all other lands about America and its people.

The Editor and Publishers.

Tiel malgrandaj estas la oferoj kiujn oni devas fari por lerni Esperanton, kaj tiel grandegaj la rezultatoj, ke oni apenaŭ povas rifuzi fari penon.

—Lev Tolstoj

"So small are the sacrifices which have to be made in learning Esperanto, and so immense the results, that one can hardly refuse to make an effort."

—Leo Tolstoy

NIA KREDO

UNU PATRO — DIO,
UNU PATRINO — TERO,
UNUJ INFANOJ — HOMOJ,
UNU DO NECESA, KOMUNA
LINGVO, KROM PATRA —
ESPERANTO.

OUR CREED

(Translation)

ONE FATHER — GOD,
ONE MOTHER — EARTH,
ONE CHILDREN — PEOPLE,
ONE, THEREFORE, NECESSARY,
COMMON LANGUAGE, BESIDES
YOUR OWN — ESPERANTO.

Pardonpeto kaj klarigo

Mi sentas ke mi devas pardonpeti centojn de miaj diverslandaj gekorespondantoj kaj amikoj, kiuj skribis al mi leterojn kaj poŝtkartojn, kaj ne ricevis de mi respondon. Eĉ por tute sana homo ne estus poveble respondi al tiel multaj korespondantoj, kaj mi, ĉagrene, estas kormalsanulo kiu malgraŭ tio, kontraŭ la konsiloj de la kuracistoj, kondukas pezan, diversspecan kaj diversflankan poresperantan laboron en Usono, speciale en ĝia centra regiono. Mi ne volas skribi ĉi tie pri detaloj. El nia gazeto kies unua numero mi penados elsendi senpage al kiel eble plej multe de samideanoj kaj al miaj ĝisnunaj gekorespondantoj, ĉiu povos juĝi pri mia laboro, kiel fondinto kaj ĉefdirektoro de Esperanta Fondaĵo (enkorporigita laŭ la leĝoj de nia ŝtato kaj lando), kune kun Esperanto-Instituto, Presejo kaj Eldonejo; kiel propagandisto, instruisto, eldonisto, redaktoro, lektoro, ĉefdelegito usona de TEJA, k.t.p. Mi esperas, ke tio klarigos al ĉiuj mian neeblecon konduki daŭre, grandskale privatan korespondanon. Tamen samtempe mi ankaŭ volas klarigi, ke mi ĉiam estas preta respondi al ĉiuj spertaj Esperantistoj kiuj skribos al mi persone, aŭ al nia gazeto, pri interesaj temoj kaj gravaj aferoj. Mi ankaŭ invitas kaj petas kunlaboron de ĉiuj.

S. A. Klukowski

LANGUAGE BARRIERS THREATEN WORLD TV

In an article entitled "TV May Travel West to Get East to Europe" which appeared in the July 3rd edition of the Milwaukee Journal, Wayne Oliver, AP writer, states that America and Europe may be connected by television via a route through Alaska, across the Bering Strait and through Siberia to Europe. Thus Oliver envisages the setting up of physical facilities for man to see and hear around the world! However, the greatest obstacle to mass international communication is the language barrier.

It may be only a short time when we can sit in our living rooms and see diplomats discuss international subjects at a European United Nations meeting. But, unless we are linguists, we will not be able to understand the speakers. As today, numerous interpreters will be required to explain what is being said. Therefore, although the expensive television and radio hook-ups are installed, we must still contend with the ancient problem of languages. What an anachronism!

The social sciences could make an enormous stride toward catching up with the physical sciences, however, if a secondary language were employed. And we have that language. It is being used. It has been tried and tested. It is a living international language.

Esperanto has been and is being taught in the schools of nations in Europe, the Orient, South America and in several American High schools and colleges. It is understood by approximately 20,000,000 persons today. The solution to the problem of language barriers has partly been attained. All that is needed now is that Esperanto be taught as a required subject in the public schools, that night classes be started and that metropolitan newspapers treat the subject seriously, as it deserves to be treated. The time to begin this program is now! International understanding is needed now. It can only be accomplished through the medium of the International Language.

KIAL LA ESPERANTA MOVADO STAGNAS ĜIS NUN EN USONO?

Trarigardante diversajn statistikojn, almanokojn, adres — kaj jarlibrojn, oni povas facile rimarki, ke **ESPERANTO** bele disvolviĝas en diversaj landoj de la tuta terglobo por la bono de la tuta homaro — nur ĉe ni en **USONO** ĝi preskaŭ vegetas.

Kio estas la kauzo de ĉi tiu stato? Ĉu en Usono ne ekzistas fervoraj kaj ofertaj propagandistoj de ĉi tiu lingvo? Ĉu ne ekzistas ĉi tie multaj delegitoj de "Universala Esperanto Asocio"? Jes, ili estas sufiĉe multaj en ĉirkaŭ 80 urboj sed multaj el ili estas nur "surpaperaj". Ili nenion faras, neniel propagandas ofte eĉ ne scias sufiĉe bone nian lingvon, por skribi aŭ paroli en ĝi. Pro tio la rezultoj de ilia agado estas senfruktaj kaj malkontentigaj.

Estas vera honto, ke inter 142 milionoj da loĝantoj en nia lando, krom Kanado, ne estas eĉ mil esperantistoj. Multaj niaj samlandanoj ankoraŭ neniam audis pri **ESPERANTO** aŭ pri mondlingva movado. La ĉefa kaŭzo de ĉi tiu stagnacio ĉe ni estas malnova, malmoderna kaj malutila sistemo de "kartelo", kiu donas profiton nur al monopolistoj kaj tre malutilas al la Esperanta movado. Se ĝis nun ne povis ekzisti kaj prosperi memstaraj librejoj kun esperantajj — tiu ĉi malĝojiga fakto estis la rezulto de malbona politiko ĉirilate. Ni devas do kuraĝe malkaŝi ĉi tiun staton antaŭ la tuta esperantistaro por plibonigi la situacion sur nia tereno kaj kiel eble plej rapide ŝanĝi la fatalan sistemon.

Tiucele antaŭnelonge ni fondis en Milwaukee poresperantan entreprenon en vere granda skalo sub la nomo "**ESPERANTO PUBLISHING HOUSE**", kies tasko estas kontraŭbatali la Esperanto-kartelon por la bono de rapida disvolviĝo de nia lingvo en la tuta Usono. Ĉiu nobla konkurenco estas

bonvena kaj saniga — do ankaŭ ĉi tiu nova entrepreno meritas vian plej grandan atenton, ĉar ĝi alportos nekalkuleblan profiton al Esperanta movado.

La nova entrepreno, tute esperanta, posedas oficejojn de "Esperanto Interlanguage Foundation Inc." (Senprofita Korporacio Poresperanta), de "Esperanto Instituto de Ameriko", Esperantan Presejon kaj Eldonejon. La redakcio volas kunlabori kun ĉiuj, kiuj agas por progreso de nia kara lingvo, sed kiuj ne volas toleri monopolon, kiu estas mortiga por nia Esperanta movado. Oni forgesis ke nia Majstro donis sian genian eltrovaĵon ne por iuspeca "negoco" de unuopuloj sed por la bono kaj utilo de la tuta homaro.

Kun granda ĝojo ni sciigas, ke ni sukcesis enkonduki Esperanton en Kollegion Beloit kaj en aliajn mez-kaj altlernejojn de nia ŝtato Viskonsino. Gravega paŝo por la tuta afero kaj internaciaj rilatoj! Ĉi tiu epoka kaj vere historia faro estas certe unika en la tuta mondo kaj esperanta gazetaro devus kiel eble plej laŭte kaj okulfrappe informi la tutan esperantistaron por elvoki ankaŭ similajn agojn en aliaj landoj de la tutmondo. Sed niaj monopolistoj kaŝas la faktojn pri nia valora poresperanta agado kaj progreso!

Antaŭ la lasta milito oni provis efektiviĝi ĉi tiun grandiozan ideon pere de t.n. "Interŝtata Esperanto-Akordo", kies aŭtoro estis Dro Czubrynski el Varsovio. Sed la plano de ŝtata doktore povus esti atingebla ne pli frue ol post longaj jaroj, kion montris la antaŭmilita praktiko. La aŭtoro pensis, ke sufiĉas interkompreniĝo de 6 ŝtatoj, kies instru-ministroj estus pretaj subskribi konvencion pri samtempa enkonduko de Esperanto en lernejojn de siaj ŝtatoj. Sed la aŭtoro forgesis,

ke por ĉi tiu decido estus necese prepari antaŭe multajn esperantajn geinstruistojn — kaj la tasko ne estis tiel simpla kaj facila. Malgraŭ tiu ĉi malfacilaĵo dum preskaŭ dudek jaroj troviĝis jam 5 ŝtatoj (Albanio, Finnlando, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakujo kaj Hungarujo), kies ministroj estis emaj subskribi la konvencion, sed la eksplodo de la lasta mondmilito malaktualigis la tutan planon.

En nunaj postmilitaj tempoj naskiĝis en Polujo alia koncepto, pli simpla pli facila kaj tute realigebla. Aŭtoro de ĉi tiu koncepto estas **Prof. Mieczyslaw SYGNARSKI** lektoro de Esperanto en Jagiellona Universitato, kiu penas ke Polujo, kiel lulilo de nia lingvo, komencu la agadon. Se Ministerio de Klerigo en Varsovio egaligus Esperanton kun aliaj instruataj lingvoj kaj konsentus ke ĝi estu laŭvole elektelebla por genjunularo — la tuta malfacila problemo estus feliĉe solvita. Ministerio de Klerigo ne bezonus multajn geinstruistojn por ĉi tiu celo ĉar la instruado povus komence okazi nur tie, kie estus instru-kapablaj pedagogoj. La enkonduko de Esperanto en lernejojn progresus iom post iom kaj ĉiujare ĝi ampleksus pli kaj pli vastajn terenojn. Avantaĝo de ĉi tiu koncepto estus tiom pli granda, ke ankaŭ la geinstruistaro mem, kiu ĝis nun malmulte interesiĝas pri Esperanto sciiginte pri egaligo de Esperanto kun aliaj naciaj lingvoj komencus certe studi nian lingvon por poste trapasi la ekzamenon kaj instrui ĝin en diversaj lernejoj kiel **devigan** instruobjekton.

La samo povus okazi samtempe en aliaj landoj, kies ministroj estus favoraj al Esperanto kaj je peto de "eminentaj" esperantistoj bonvolus senpere kontaktiĝi kun siaj kolegoj de aliaj landoj. Ĉi tio tute ne estas "utopio", ĉar okazis jam en pasinta jaro similaj interkontaktiĝoj inter ministro rilate al poŝtaferoj. Ĉi tiun gravan laboron gvidis en Aŭstrujo tre agema kaj bedaŭrinde nun grave malsana s-ano Rudolf Michael Frey. Ankaŭ en Aŭstrujo meritplena pioniro de nia movado, s-ro Hugo Steiner, aranĝis en diversaj partoj de sia lando kvazau plebisciton pri enkonduko de Esperanto en lernejojn kaj tiea instru-ministro estis jam ema subskribi ĉirilate interkonsenton, se anoncus sin almenau 2-3 aliaj ŝtatoj. Sed ĝis nun neniu ŝtato kuraĝis fari la unuan paŝon, kvankam en multaj landoj dank al laboro de senlaciaj esperantistoj la afero ĉiam pli maturiĝas. Gojige tamen estas, ke ni la samon jam efektivas fondinte grandskalan poresperantan entreprenon, alportontan certe al nia lando gloron kaj al la tuta homaro neantaŭvideblajn avantaĝojn.

Ni iros antaŭen, malgraŭ la malfacilaĵojn kaj barilojn metatajn antaŭ ni de monopolistoj. Senĉese kaj senlace ni daŭradus nian poresperantan laboron ĝis la venko.

SUPERA STAL-PRODUKTA KORPORACIO

FABRIKOSTOJ DE

PATRICARO KAJ STALFABRIKAJOJ

(Manufacturers of Die Sets and Steel Fabrications)

SUPERIOR STEEL PRODUCTS CORP.

2754 South 19th St.

CASIMIR JANISZEWSKI

President

Milwaukee 7, Wis., U. S. A.

KAZIMIRO JANIŠEVSKI

Prezidanto

ESPERANTO WORLD NEWS

GERMANOJ SENDAS PETICIOJN AL UN RILATE AL ESPERANTO

D-ro Siegfried Ziegler, profesoro de Esperanto en Munika Universitato, k prezidanto de Federataj Esperantaj organizacioj en Germanujo k ankaŭ redaktoro de "La Ponto", skribas en tiu gazeto, ke 6,613,757 Germanoj ĝis nun subskribis peticiojn al UN favorante la interlingvon Esperanto kiel oficiala lingvo por internaciaj interkomunikadoj.

AŬSTRIA ĜENERALA POŝTDIREK- TORO RADIOPAROLIS ESPE- RANTLINGVE

D-ro Karl Dworschak, ĝenerala poŝtdirektoro Aŭstria, parolis la 21-an de majo germanlingve al la aŭstria publiko k esperantlingve al la esperantistaro per Radio-Wien, pri la nova Esperantopostmarko, ĉiuloke havebla post la 17-an de junio.

LA UNIVERSALA KONGRESO

Ci jare la Universala Esperanta Kongreso okazis la 6-13-an de aŭgusto en Bournemouth, Anglujo. Nur du mil delegitoj de la tuta mondo povis partopreni pro la manko de loĝejoj. Laŭ la Esperanta gazetaro ĉiuj reservaĵoj estis jam menditaj je la mezo de junio.

ESPERANTAJ POŝTMARKOJ

Multe da landoj — tro multe por menciigi — eldonis Esperantajn poŝtmarkojn antaŭ la lasta postmilito. Depost la dua mondmilito, la sekvantaj landoj eldonis poŝtmarkojn kun Esperanta teksto: Austrujo, Brazilujo, 2, k Bulgariujo. Krom tio la poŝtoficejoj en Austrujo k Germanujo uzas poŝtmarknulgilo kun teksto esperanta. La supre menciitaj k aliaj Esperantaj poŝtmarkoj oni povas vidi en nia oficejo.

ILI PAROLAS KUNE DEK LINGVOJN, SED...

En le revuo "Film", n-ro 9/1949, ni legis la jenan instruan anekdoton:

Ingrid Bergman filmas ĉe Rossolini en Italujo. Ŝi parolas svede, norvege, dane, nederlande k angle. Rossolini parolas itale, france, hispane, germane k greke. Dek eŭropaj lingvoj kune "sur unu amaso" — pardonu: ĉe du homoj, k tamen ili bezonas trian: interpretiston.

ANONCETOJ

Unu respondkupono por ĉiuj du vortoj, aŭ egalvaloro en usona mono.

GERMANS SEND PETITIONS TO UN IN FAVOR OF ESPERANTO

Dr. Siegfried Ziegler, professor of Esperanto at the University of Munich, and President of the Federated Esperanto Organizations in Germany, as well as editor of "La Ponto" (The Bridge), writes in that Esperanto periodical, that so far 6, 613,757 Germans have written petitions to the United Nations in behalf of the international language, Esperanto, as the official language for international communication.

POSTMASTER GENERAL OF AUSTRIA SPEAKS OVER THE RADIO IN ESPERANTO

Dr. Karl Dworschak, postmaster general of Austria, spoke the 21st of May in German to the public, and in Esperanto to the world Esperantists, over the state radio station in Vienna. His topic was the issuance of a new Esperanto postage stamp, available everywhere since June 17th.

WORLD ESPERANTO CONGRESS

This year the annual Universal Esperanto Congress was held from August 6-13 in Bournemouth, England. Only two thousand delegates from all over the world could participate due to lack of accommodations. According to the Esperanto press all reservations had already been filled by the middle of June.

ESPERANTO POSTAGE STAMPS

Many countries — too numerous to mention — have issued Esperanto postage stamps before the last world war. Since the end of World War II, however, the following countries have issued postage stamps with the Esperanto text: Austria, Brasil and Bulgaria. In addition, the German and Austrian post offices are using cancellation stamps with the text in the international language. These stamps and others too, can be seen in our office.

INGRID BERGMAN AND ROSSOLINI SPEAK A TOTAL OF TEN LANGUAGES, BUT...

In the periodical revue "Film", No. 9/1949 we read the following interesting item:

Ingrid Bergman is filming with Rossolini in Italy. She speaks Swedish, Norwegian, Danish, Dutch and English. Rossolini speaks Italian, French, Spanish, German and Greek. Here two people, who speak a total of 10 languages, need a third: an interpreter.

ESPERANTO ĈE USONA ALTILERNEJO

Usona asekura kompanio eldonis karton kun Esperanto-teksto.
Milwaukee, Wis. — Centro de Esperanta Aktiveco en Usono

En februaro 1948 malfermis la fama centjara Kolegio Beloit en la urbo Beloit, usona ŝtato Wisconsin, unuafoje Esperanto-kurson. Tri monatojn antaŭe s-ano S. A. Klukowski, ĵurnalisto en Milwaukee, paroladis antaŭ Rotari-klubo en Beloit pri Esperanto. Inter la aŭskultintoj troviĝis pluraj membroj de fakultato kaj de la estraro de l'kolegio. Oni invitis lin prelegi ankaŭ en la kolegio; rezultis la nomita kurso, kiun pro manko de instruisto gvidas s-ano Kl. mem, kvankam li loĝas 70 mejlojn distance de Beloit.

Post du kursoj en 1948 k 1949, kiuj estis granda sukceso, estraro de kolegio decidis daŭre instrui Esperanton kiel plenkredita subjekto. Intertempe kelkaj aliaj lernejoj en Wisconsin enkondukis Esperantajn kursojn.

Dum la pasinta vintro, s-ro Kl. prelegis pri Esperanto en kluboj de Rotario, Kivanis, Leonoj, Civitanoj k.a. en la urboj Beloit, Edgerton, Fond du Lac, Germantown, Kenosha, Milwaukee, Port Washington, Sheboygan, Waukesha kaj West Allis; antaŭe li prelegis en Stevens Point, Wausau, Wisconsin Rapids ktp. Post la milito Kl. prelegis pri Esperanto jam pli ol centfoje, kaj diversaj ĵurnaloj publikigis favorajn raportojn pri tiuj prelegoj.

Laŭ instigo de s-ro Kl. publikigis la prezidanto de "Hardware Mutual Insurance Companies" (fervaraj komunaj asekuraj kompanioj) en Stevens Point koloran bildpoŝtkarton kun teksto en angla lingvo kaj Esperanto; la karto montras la ĉefoficejon de la nomitaj kompanioj, kiu estas la plej granda kaj plej bela konstruaĵo en la urbo.

Similajn naturkolorajn bildpoŝtkartojn de l'urbo Milwaukee kun Esp-a teksto presigis de la sama instigo de s-ro Klukowski p.k. fabriko E. C. Kropp K-io. Krom tio s-ro Kl. mem presigis p.k. kun himno esperanta k de kolegio Beloit.

(Por tiuj kiuj ne scias: Wisconsin estas ŝtato en la norda parto de centra Usono, inter la lago Michigan kaj la rivero Mississippi. Ĉefurbo estas Madison kun la ŝtata Kapitulo, sed la plej granda kaj ĉefa urbo estas Milwaukee kun 700,000 loĝantoj. Wisconsin celebris lastjare sian centjaran jubileon kiel usona ŝtato.)

AL NIAJ KORESPONDATOJ

Memoru, ke la internacia ordo de la adreso estas: nomo, strata aŭ villaĝa adreso, urbo aŭ poŝtoficejo, lando, kontinento. Malĝusta ordo kaŭzas facile erarajn.

USONA REVUO

U. S. of N. A. Esperanto Revue

Published monthly by the

ESPERANTO

INTERLANGUAGE FOUNDATION, Inc.

1018 W. Lincoln Ave.

Milwaukee 15, Wis. U. S. A.

Monata gazeto internacia de

Interlingva Fondaĵo, (Korporacio)

S. A. Klukowski, Editor (Redaktoro)

Yearly subscription\$1.50

Jarabonprezo\$1.50

"Mi ne estas Athinaiano aŭ Grekano, sed mondĉivitano."

—Socrates

"I am not an Athenian or a Greek, but a citizen of the world."

—Socrates

AL NIAJ GELEGANTOJ

Sur la kampo de l'esperantista laboro ni usonanoj, kiel plugistoj de nova kontinento, aperis sufiĉe frue, sed bedaŭrinde nia poresperanta laboro ne atingis ĝis nun tiajn rezultojn, kiel ĝi atingis en aliaj, malpli feliĉaj landoj, kaj ĝi ne estis tiel fruktodona kaj efika, kiel ni tion dezirus.

Kiam en ĉiuj preskaŭ landoj bolas la granda laboro por nia ideo, kiam esperantaj greneroj, ĵetitaj en la teron, alportas ĉiam pli grandajn sukcesojn sur diversaj laborkampoj — en nia lando ĉio kvazaŭ stagnus. Ni devus do aperi antaŭ la tuta esperantistaro kun ruĝo de honto sur niaj fruntoj, kiel laboristoj halaktivaj, malfruiĝintaj, kiuj vekigas en tagmeza horo — tiam, kiam la suno trapasis jam longan vojon kaj brile lumas el la supro de l'ĉielo.

Sajnas, ke en la momento de l'ekvekiĝo devus nin premi iu doloriga penso, ke kvankam ora arbo de l'internacia lingvo alportis altkvalitajn fruktojn al aliaj landoj — nia tero estis por ĝi tro malmola, tro malvarma... Tamen kun plena konscio de la ĝisnuna stagno, kun hel-serena frunto, kun forta deziro kaj okuloj tute ne kovritaj per nebulo de longa dormado — ni, usonanoj, volas nepre vekigi kaj inciti aliajn al komuna laboro, al **fina venko**.

Per ĉi tiu nova eldonaĵo, kiun ni havas hodiaŭ la plezuro prezenti al vi, karaj Samlandanoj kaj Gesamideanoj el proksimaj kaj malproksimaj landoj,

NI SALUTAS VIN!

Ekvidente ĉi tiun novan gazeton, vi certe miros kaj demandos — por kio ni bezonas novan esperantan gazeton, se en la tuta mondo ekzistas tiom da diversaj esperantaj gazetoj kaj monataj revuoj. Jes, vi estas pravaj! En la tuta mondo ekzistas multaj diversaj esperantaj gazetoj de la plej mizeraj

ĴURO DE LOJALECO

(Pledge of Allegiance)

Mi furas lojalecon al la Standardo de Usono kaj al la Respubliko kiun ĝi simboligas. Unu nacio nedividebla kun libereco kaj justeco por ĉiuj.

Mi ankaŭ furas lojalecon al la Verda Standardo, la simbolo de monduneco, de la rajto al mondĉivitaneco kaj de homarfrateco per interkompreno, kun libereco kaj justeco por ĉiuj.

Ĝis tre luksaj. Sed en nia lando sentiĝas granda bezono de iu populara poresperanta gazeto, kiu povus bone, objektivite informi niajn samlandanojn kaj la tutan esperantistaron pri nia esperanta movado, pri niaj ĉiutagaj sukcesoj kaj okazintaĵoj sur la "verda kampo". Nia lando estas tre granda rilate al la vastegaj terenoj, kiel ankaŭ al la nombro de loĝantaro, kaj konkurenco ĉi tie donos certe nur profitojn al nia movado.

Ni prenis sur nin tre malfacilan kaj grandan taskon, se temas pri nia tuta esperanta entrepreno, ne nur pri ĉi tiu monata revuo, ni riskis milojn da dolaroj, sed ni esperas, ke vi ĉiuj "pacaj batalantoj" helpos nin volonte en tiu serioza laboro por la bono de nia granda ideo. Ni volas per nia organo ekinteresiĝi por nia lingvo homamasojn, kiuj estis ĝis nun tute indiferentaj aŭ eble nenion aŭdis kaj sciis pri nia lingvo, kiel la plej perfekta interkompreniĝilo en la tuta mondo. Nia celo estas krom tio **cementi internacian unuecon kaj fratan solidarecon inter tutmondaj gesamideanoj**.

Ni komencas aperi tiun modestan gazeton, esperante, ke ĝi plifortigos kaj revivigos nian "dormeman" esperantan movadon en Usono, kie ĝis nun nia lingvo malmulte progresis, kvankam ne mankas ĉe ni oferemaj "laboristoj". Aliloke vi trovos la klarigon de ĉi tiu fenomeno — nun ni volas nur peti vin pri via ŝatata helpo — morala kaj materiala — ĉar sen ĉi tiu apogo ni povos nenion atingi.

Bonvolu do, karaj Gelegantoj kaj Amikoj, ĝustmaniere kritiki nian laboron, sed ne miru, se nia laboro komence ne estos tuj perfekta. Ni atendas de vi bonajn konsilojn, sugestojn kaj realigeblajn (ne utopiajn!) proponojn. Ni volas kunlabori kun ĉiuj, kiuj scipovas labori kaj volas labori por nia komuna afero. Ni alvokas kaj invitas ĉiujn bonvolemajn Gesamideanojn al komuna laboro, al komuna agado por fina venko de nia grandioza IDEO!

R e d a k c i o

"I look upon the world as my parish."

(Mi rigardas la mondon kiel mia paroĥo.) — John Wesley

ARE ROTARIANS & KIWANIANUS USING ESPERANTO?

(Rotarianoj k Kivanisoj Esperantistoj)

LA KVARA CELO DE ROTARIANOJ

La progresigo de interkompreno, bonvolo kaj internacia paco per tutmonda frataro de komercaj kaj profesiaj homoj unuiĝintaj en la Rotaria idealo de servado.

Among the Rotarians in foreign countries with whom we have been corresponding for several years are the following:

John A. Peart, M. A., Director of Education for Winchester, and Honorary Secretary of the Rotary Club of Winchester, England; also editor of the Rotary paper, District 11.

Jozka Škorpil, author & businessman, co-owner of a department store Škorpil & Skalicky; secretary of the Rotary Club in Tabor, Czechoslovakia.

Vilho Setala, magistrate, editor and publisher, Helsinki, Finland.

Prof. Gaetano Facchi, linguist and agriculturist, member of the Brescia Rotary Club, Brescia, Italy.

Prof. G. Azzi, member of the Rotary Club in Como, Italy.

Hilario Zayas, President of the Electric Co. of Cuba (Compania Cubana de Electricidad), member, Rotary Club of Manzanillo, Cuba.

KIWANIANS WHO ARE MEMBERS OF OUR ORGANIZATION

Dr. Jay H. Keitner, member of the Bay View Kiwanis Club, Milwaukee.

S. H. Funk, D. O., and **R. H. Richardson, D. C.**, members of the Beloit Kiwanis Club.

A. Bartosz, Esq., editor, member Stevens Point Kiwanis Club.

We ask all the International Service clubs and their members — individually and collectively — who believe in the need of promoting international good-will and understanding, to give us a helping hand, morally and materially, to help us carry on our great work for the good and benefit of all.

* * *

Our Lecture Bureau is well prepared, and will be glad to furnish a competent and interesting speaker for any educational, cultural, civic or service club or society. Please call or write to the Esperanto Foundation, 1018 W. Lincoln Ave., Milwaukee 7, Wis. Phone Mitchell 5-8477.

"My country is the world and to do good is my religion."

(Mia patrujo estas la mondo kaj fari bone estas mia religio.)

—Thomas Paine

"My country is the world. My countrymen are humanity."

(Mia patrujo estas la mondo. Miaj samlandanoj estas homaro.)

—William Lloyd Garrison

**"MI NOMAS TIUN
MENSON LIBERA . . .**

kiu kontraŭstaras la ligilon de kutimo, kiu ne mechanike ripetas sin mem kaj kopias la pasintecon, kiu ne vivas per siaj malnovaj virtoj, kiu ne sklavigas sin pro precizaj reguloj, sed kiu forgesas tion kio estas malantaŭe, aŭskultas por trovi novajn kaj pli altajn avertojn de konscienco, kaj ĝojas elverŝi sin en freŝajn kaj pli altajn penandojn."

Translation

**"I CALL THAT
MIND FREE . . .**

which resists the bondage of habit, which does not mechanically repeat itself and copy the past, which does not live on its old virtues, which does not enslave itself to precise rules, but which forgets what is behind, listens for new and higher monitions of conscience, and rejoices to pour itself forth in fresh and higher exertions."

—William Ellery Channing.

**NETHERLANDS PRIME MINISTER
EXPLAINS IN ESPERANTO**

"Esperanto-Press" — with headquarters in Zurich, Switzerland, — and with an accredited correspondent at the United Nations — just sent out its first "UN-Bulletin", in which the Prime Minister of the Netherlands, Willem Drees, defends the Netherlands thesis relating to Indonesia. He requests "free citizens in a free state" and declares that Netherland desires to turn over, as soon as possible, the full sovereignty to the normal government of the Indonesia Federation, with whom it desires to cooperate on the basis of a Netherland-Indonesian Union. Mr. Drees certainly is a progressive man, because he himself wrote the article in Esperanto, and consequently is so far the only prime minister, who learned and applies in practical use the international language.

ESPERANTO EN ITALUJO

Signifa estas la agado sur la propaganda kampo, de Itala Esperanto-Federacio kaj de Itala Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj, kaj tiu de Itala Instituto de Esperanto sur la instrua kampo. En Milano kaj Venezia okazis interesa ekspozicio de infandeseĝnaĵoj, per Esperanto internacie organizita. En Firenze, Lecce kaj Milano faris paroladojn kol. Pagni, D-ro De Benedetto, Prof. Piatti; ĉe Radio-stacio en Romo paroladis P-ro Carolfi, en Trieste D-ro Chiussi. Ĉe multaj sekcioj de Eŭropa Federalisima Movado estas aprobitaj rezolucioj por Esperanto. Favora al la instruado de Esperanto al ŝtata fervoja oficistaro estas la Administracio, kaj en multaj lokoj funkcias kursoj por fervojistoj. Instituto kaj Federacio vigle zorgis ĉe Ministerio de Publika Instruado pri agado favore al enkonduko de Esperanto en la ŝtatajn lernejojn. Rapide elĉerpiĝis la unua eldono de lernolibro por kursanoj kaj memlernantoj, verkita de nia veterano Prof. C. Grazzini. Multaj kursoj okazis. Nun gvidas kursojn en Milano Prof. Piatti kaj Pugno; en Firenze inĝ. Martini, Prof. Pacelli; en Romo P-ro Carolfi, libr. Ruggiero; en Torino Prof. Antonelli, Bogliano, Borione, Castiglioni, Conterno, Fighera, Fop, Rossi, Spini, Zan, Zerbino (ĉar la kursoj estas tre nombraj); en Bologna inĝ. Nanni; en Chiappa del Cervo Prof. Rivera; en Lecce D-ro De Benedetto; en Mantova Prof. Barano; en Padova inĝ. Saggiore; en Piombino s-ro Bartolozzi; en Ragusa adv. Biscarino. En marto aperis itallingva nova revuo "Italia Esperantista".

**LEADING WORLD EDUCATORS,
FARSIGHTED STATESMEN AND
PRACTICAL BUSINESSMEN ARE
ALL IN FAVOR OF, SUPPORTING
AND USING THE INTERLANGUAGE
ESPERANTO**

**UNUA OFICIALA PAŜO PRI
TUTMONDA PARLAMENTO**

**THE FIRST STEP TOWARD
WORLD PARLIAMENT**

So far 22 American States have elected delegates to the World Congress

(El "Informoj pri Mondregistraro", n-ro 1, eldonita de "Crusade for World Government", Londono.)

Tennessee (usona ŝtato) aprobis leĝprojekton kiu rajtigas la elekton de tri ŝtataj delegitoj al la Tutmonda Konstitucifara Kongreso, kiun oni intencas okazigi de 1950 ĝis 1955. Simila balotado por elekti la britajn delegitojn okazos post proksimume 18 monatoj.

La precedenca leĝprojekto estis aprobita en la Senato de Tennessee sen malkonsenta voĉdono, kaj en la Ĉambro de Deputitoj per voĉdono de 76 kontraŭ 1.

"Kiam guberniestro Browning metis sian subskribon sub la leĝprojekton, li atingis mondsignifan agon," diris s-ro Fyke Farmer, Nashville'a advokato, kiu estigis la planon. "La aprobo de la projekto estas sen paralelo en la historio de parlamentoj. Mi kredas, ke la informo pri ĝia sankciiĝo en Tennessee kreskigos la esperojn de homoj tra la tuta mondo, kiuj laboras por mond-paco."

La aŭtoro de la mond-paca leĝo diris, ke similaj leĝprojektoj atendas pri-traktadon en la ŝtatoj Pennsylvania, New York kaj Michigan, kaj ke la guberniestroj de 32 ŝtatoj esprimis intereson pri la ebleco de leĝdona agado. Aldone s-ro Farmer diris, ke mondregistaraj organizaĵoj en Kanado, Britujo, Francujo, Danujo kaj Svisujo observis la rezulton en Tennessee.

Senatano W. A. ("Bud") Harwell de Lawrenceburg prezentis la leĝprojekton en la Senato, kaj deputito Otis K. Kippers, ankaŭ de Lawrenceburg, prezentis ĝin en la Ĉambro.

La leĝo ordonas, ke la delegitoj, ĉeestante la Kongreson, ricevu salajron, kiu egalas al tiu de usonaj senatanoj, plus vojaĝa, sekretaria kaj aliaj elspezoj.

Esperanto Linguaphone Home Study Courses

You can learn the universally accepted and used world language, ESPERANTO, or any of the national languages listed below, by the world-renowned Linguaphone Ear-Eye Method. Order through the Interlanguage foundation

Esperanto	Russian	Greek	Persian
Italian	Malay	Swedish	German
Latin	Finnish	Hebrew	Dutch
Polish	Arabic	Bengali	Spanish
Chinese	French	Norwegian	Hindustani
Irish	Japanese	Czech	Afrikaans
English	Portuguese	Hausa	Effik

The complete Esperanto course, consisting of fifteen double-faced ten inch records, with the text printed in separate booklets, is \$50.

Members of our organization and teachers will receive special consideration. Write to the —

Interlanguage  Foundation, Inc.

1018 W. LINCOLN AVE.

MILWAUKEE 7, WIS.

**NI PRESADAS
ĈION POR ĈIUJ**

**DE LA NEGOCKARTO
AL LA LIBRO**

**WE PRINT EVERYTHING
FOR EVERYBODY**

**FROM A BUSINESS CARD
TO A BOOK**

In English or in Esperanto

**ESPERANTO
PUBLISHING HOUSE**

1018 W. LINCOLN AVE. PHONE MI. 5-8477

KARL FRODING

La 26an de Aprilo 1949 mortis Karl Froding, unu el la plej sindonemaj apostoloj de Esperanto.

Karl Hjalmar Froding estis naskita la 7an de Oktobro 1886 en Hjoje, Svedujo kaj venis al Usono kiam li havis 17 jarojn, loĝante kun sia fratino, Ellen, kaj ilia geonkloj Odelius en Rockford, Ill. Laborinte dum kelkaj jaroj li ĉeestis la Augustana College en Rock Island, Ill., kie li kontentiĝis sian deziron lerni fremdajn lingvojn. Kiam li eklernis Esperanton lia vivcelo ŝajnis esti atingata.

Li nun instruis Esperanton, verkis lernolibrojn, aĉetis kaj vendis Esperantajn librojn detale kaj pogrande. Li ankaŭ tradukis kelkajn verkojn en Esperanton kaj dum sep jaroj li eldonis la "Scienca Gazeto"-n kun financaj perdoj. Li vojaĝis en Meksikujo, Ĉilio kaj Argentino kie li studis le hispanan lingvon kaj la praciivilizacion de la Indianoj. Li ankaŭ verkis gramatikon de la Siua (Indiana) lingvo kaj intencis kolekti gramatikojn kaj vortarojn de la estingantaj Indianaj lingvoj por konservi ilin al la estonteco. *)

Dum Esperanta kurso li konatiĝis kun F-ino Esther L. Loofboro, al kiu li edziĝis la 11-an de Aprilo 1936. Ili vivis en Rockford, Ill., ĝis Aprilo 1948 kaj poste aĉetis malgrandan bienon en New Auburn, Wis. Oni ne devas forgesi ke dum la unuaj jaroj de sia esperantisteco li eldonis malgrandan revuon "Skandinava Esperantisto".

Samideano Froding postlasas sian edzinon, du filojn, Ray Roberto, 10-jara kaj Kent Ellston, 8-jara, unu fratino en Chicago kaj tri en Svedujo.

Li kredis sincere ke Esperanto antaŭenigus universalan komprenon inter le nacioj kaj pro tio li laboris por nia afero senlace, senrekompence kaj kun fervoro kiu ofte devigis lin al gravaj financaj oferoj. Per la morto de Karl Froding la Esperanta movado perdis unu el siaj plej agemaj apostoloj, kiu tenis la verdan standardon en alta pozicio kiam aliaj malefike laboris.

Al lia familio nian plej sinceran kondolencan en ilia perdo.
Milford, Conn.

D-ro J. J. Sussmuth

*) Li komisiis min verki gramatikon kaj vortaron de la "Lenapa (Delaware) lingvo por lia nova "Homstuda Revuo".

MRS. C. JANISZEWSKI TOURING EUROPE

Mrs. Casimir Janiszewski, wife of the well known Milwaukee Industrialist, is spending several weeks in Europe, visiting relatives, and otherwise looking over the Old World after World War II. At this writing Mrs. Janiszewski has not returned yet, but was expected home soon.

"OKCIDENTA VIRGINIO"

The West Virginia Publicity Commission, at the request of the State Conservation Department prepared a booklet for the purpose of attracting international travelers and tourists to that state. The actual preparation and completion of the booklet was accomplished through the initiative and untiring efforts of Mr. Roland W. Ruff, a citizen of St. Albans, W. Va. Mr. Ruff gathered and translated most of the material which was in itself very interesting and well written.

Mr. Ruff's hard work, however, seems to have been to no avail, because the Commission published his fine work on inferior paper, in a mimeographed form. The attractiveness of any advertising piece is as large a factor in promulgating trade and travel as its written contents. Consequently this booklet has not achieved its purpose. If the commission had delved into the matter it would have seen the very fine grade of work that has been turned out in war-torn Europe along these lines in the form of printed booklets and folders. The entire Commission has committed a grievous error, which can still be corrected, making better use of the Esperanto material gathered.

MISS EMMA JUNGTON TOURING EUROPE

Miss Emma Jungton, 1702 N. 32nd St., left by plane for Europe on June 23, and expects to return home by the end of August. She is the daughter of Mr. and Mrs. John Jungton of the same address. All are Esperantists; in fact her parents are the oldest Esperantists in Milwaukee in whose home much of the Esperanto activities took place or were planned. Miss Jungton is a teacher at Custer High school. She will visit France, Germany, Switzerland, Denmark and other countries, before returning to the U. S.

ESPERANTIST MARK STARR TO VISIT MILWAUKEE

Mr. Mark Starr, educational director of the International Ladies Garment Workers Union of New York left for Copenhagen, Denmark, to participate in a meeting of UNESCO on Adult Education. Mr. Starr is a well known Esperantist whom the United States government sent to Japan in 1947. He assisted the military government of General McArthur in educating the Japanese labor leaders on American unions. After his return, he wrote a very interesting article in his union paper on how Esperanto helped him to overcome language difficulties in Japan. We hope to be able to reprint his article in one of our future editions.

Mr. Starr will visit us during the convention of his Union to be held in Milwaukee the week end of August 22nd.

LE ESPERO**(THE ESPERANTO HYMN)**

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion;
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l'espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popolo faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
En labora paca ne laciĝos
Ĝis la bela sonĝo de l'homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

THE HOPE**(FREE TRANSLATION)**

A new sentiment has come into the world.

A mighty call is passing through the land;

On wings of light breeze

From place to place now let it fly.

Not to the sword thirsting for blood
Does it draw the family of mankind;
To the ever warring world

It promises holy harmony.

Under the sacred sign of hope
Peaceful combatants are gathering
And the cause is rapidly growing
Through the labor of the hopeful.

Strongly stand the walls of thousands
of years

Between the divided peoples;
But the obstinate barriers shall leap
asunder

Beaten down by sacred love.

On a neutral lingual foundation,
Understanding one another,
The nations shall form in agreement
One great family circle.

Our diligent colleagues
Will not weary of their peaceful labour,
Until the beautiful dream of mankind
For eternal blessing shall be realized.

Pri Kio Homoj De Aliaj Landoj Skribas Al Ni What Are People From Other Lands Writing To Us

LETERO EL JAPONUJO

Wakayama, 27 Aprilo, 1949.

S-ro Stanley A. Klukowski:

Permesu al mi skribi al vi, Mi scias vian nomon de S-ro Y. Maeda ĉiurbo, mi estas Direktoro de Eksterlanda Komerca Asocio de Wakayama kaj estas kvarok jarulo, mia okupo estas eksporti manufakturaĵajn produktojn de societanoj al alilandoj.

Nun ni eksportadas al via lando:— Fishing Pools, Lacquer Wares, Canned Mandarins, Handkerchiefs, Fly Hooks, Animal-Toys.

Ni Japanoj devas klopodi eksportan manufakturaĵojn, bonajn kaj mallaltajn en la prezo, por vivi. Sed mi pensas ke la komerco naskiĝos en la amikeco, do, mi deziras komerci kun alilandanoj per Esperantan amikecon. Mi petas, ke vi rekomendu min al tiuj kiuj havas intereson importi supreskribitajn produktojn al viaj amikoj.

Tute Via.

Minoru Iwasaki.

Wakayama Eksterlanda Komerca Asocio.

(WAKAYAMA-KEN BOEKI KYOKAI)
1-chome, Komatsubaradori,
Wakayama, Japanujo.

JAPANESE DESIRES AMERICAN MARKETS

Wakayama (Japan), April 27, 1949

Mr. Stanley A. Klukowski:

Permit me to write to you. Your name was given to me by Mr. Y. Maeda of this city. I am the director of the Foreign Commerce Association of Wakayama, twenty eight years of age, and my occupation is exporting manufactured products of members of our Association to other countries.

Now I am exporting to your country: fishing poles, lacquer wares, canned mandarins, handkerchiefs, fly hooks and animal toys.

We Japanese must now take steps to export our manufactures, good and cheap in price, in order to live. But I think that (international) commerce will be born in friendship, therefore I wish to do business with people of other lands through friendly Esperanto. I ask of you (if you please) recommend me to those who are interested in importing products above described.

Entirely yours,

Minuru Iwasaki.

* * *

DE JUGOSLAVUJO

Mi estas slovena esperantisto — estinta ĵurnalisto — kiu deziras korespondi kun esperantaj ĵurnalistoj en tiel nomataj kapitalistaj landoj. De tempo al tempo mi volas sendi al vi ilustritajn poŝtkartojn por ke vi povu rekonii la belecon de nia lando. Por ni estas interese scii kia estas vivo de la ĵurnalistoj en via lando. Ĉu vi estas libera en via profesio aŭ vi devas skribi laŭ deziro kaj postulo de la eldonistoj. Se vi sendos al mi esperantan gazeton, sendos ankaŭ mi la nian. Se estas interese por vi aŭ via legataro, mi povas priskribi la vivon de nia popolo dum okupacio de Hitler.

Kun samideanoj salutoj,

France Zagradišnik

FROM YUGOSLAVIA

I am a Slovenian Esperantist — a former journalist — who wishes to correspond with Esperanto journalists in so called capitalistic countries. From time to time I want to send you beautiful illustrated post cards so that you can get acquainted with the beauty of our country. For us it would be interesting to know how newspapermen in your country live. Are you free in your profession, or must you write according to the wishes and demands of the publishers? If you will send me an Esperanto paper I will send you one of ours. If it would be of interest to you and your readers, I can describe the life of our people during Hitler's occupation.

France Zagradišnik

Trbovlje, Slovenija, Jugoslavija.

EKSPORTISTOJ DE UZITAJ VESTAJOJ

POR VIROJ, VIRINOJ KAJ INFANOJ

Ni volonte respondos al ĉiuj demandoj

OVERSEAS SHIPPING COMPANY

TRANSMARA ŜIPTRANSPORTA K-IO

1016 W. BRUCE ST.

MILWAUKEE 4, WIS., U. S. A.

Telegrafadreso: OSCO, Milwaukee, U. S. A.

"ESPERANTO PROPHECY"

A quarter of a century ago — in 1924 to be exact — the Sunday New York American published an article entitled "RADIO IS GIVING IMPULSE TO AN INTERNATIONAL LANGUAGE", in which the eminent author Upton Sinclair said:

"I venture to prophecy that it won't take three centuries, but only three decades for 9,995 persons out of every 10,000 to be listening to the radio in Esperanto. — If you think that I am unduly optimistic as to time, let me mention that it takes years to learn to read English or French or German or Russian: but an average person can learn to understand Esperanto in three or four weeks."

One may or may not be in accord with the social or economic views of Upton Sinclair, but his prophecy regarding the international language, Esperanto, is coming through fast. This is best proven by the fact that at the time the above article was written, Esperantists were counted by the thousands, now they are counted by the millions.

In an article on languages in general in "This Week" magazine of October 28, 1945, Dr. Mario A. Pei, of Columbia University stated:

"Esperanto, spoken by less than 20,000,000 is the only living international language."

Since the end of World War II, Esperanto has been growing by leaps and bounds, so much so, that it is difficult to follow everywhere its real progress. No doubt that it gained several more million new adepts. We can only judge its great progress by the tremendous amount of mail we receive from all parts of the world in Esperanto; from the Book of the Month clubs and Esperanto publications mushrooming in all civilized countries; that more and more business houses, industries and transportation companies, especially in foreign lands, are advertising in Esperanto: in inter-language newspapers, printing folders, and over the radio. Speaking of radio, many state-owned stations are now regularly broadcasting in Esperanto daily, others weekly.

CATHOLICS AND ESPERANTO

Mi konstatas la utilecon de Esperanto por konservi unuecon inter Katolikoj de la mondo. Esperanto havas antaŭ si grandan estontecon.

* * *

"I recognize the usefulness of Esperanto for preserving unity among Catholics of the world. Esperanto has before it a great future."

—Pope Pius X

The Esperanto Interlanguage Foundation Inc.,

is a non profit, educational, cultural, and service organization, established for the purpose of co-ordinating all activities of the Esperanto Movement in America; to promote in every way the teaching, study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto, as means of international communication; to promote good-will and understanding among people of all nations; to stimulate world education, free exchange of information, world trade, and to foster better international business and human relations by:

- a) Publishing and distributing literature containing information about Esperanto.
- b) Publishing text books, readers, etc., for school and home use.
- c) Promoting the formation of new local groups and classes.
- d) Conducting a lecture bureau, and promoting lectures and conferences.
- e) Conducting world-wide advertising service.
- f) Conducting an information center regarding world travel, and providing contacts with people in other lands for educational, cultural, social and business purposes.

WHO CAN BECOME A MEMBER?

Any person may become a member who subscribes to the ideals and purposes of the Esperanto Interlanguage Foundation.

For further information and literature, please communicate with:

INTERLANGUAGE FOUNDATION, INC.

1018 W. Lincoln Ave., Milwaukee 7, Wis.

Any dues paid or contributions made to the Interlanguage Foundation are deductible from your income tax.

Membership classifications: Regular member \$3; Student member \$1; Active member \$5; Sustaining member \$10; Donor member \$25 or more; Life member \$100. *All memberships, except students include subscription to the U. S. Esperanto Revue.

BUTTER HARDWARE BUTTER FERAĴILOJ

THE LATEST MERCHANDISE

La plej novaj varoj

DISPLAYED IN THE MOST MODERN WAY
prezentitaj en la plej moderna maniero

CURTIS WOODWORK
Lignaĵiloj de Curtis

SCHLAGE LOCKS
Seruroj de Schlage

YALE HARDWARE
Feraĵiloj de Yale

THE BUTTER HARDWARE CO.


1730 S. 13th St.

Milwaukee 4, Wis., U. S. A.

"OVER 75 YEARS OF SATISFACTORY SERVICE"
"Kontentigita servado dum pli ol 75 jaroj"

SALES AND SERVICE

VENDADO KAJ SERVADO



HOLMES MOTOR CO.

5006 W. LISBON AVE.

KI. 5-8900

MILWAUKEE, WIS.

See How Easy It Is To Learn Esperanto

The international language is easily learnt even by persons not having much schooling. One hour is usually sufficient to learn the entire grammar, several days to read, several weeks to write, several months to speak. Esperanto is really simple, flexible, nice-sounding and international in its elements; by means of a small amount of roots one can make up a great number of words due (thanks) to the practical system of prefixes and suffixes. This language fits perfectly for international relations, even for literature and poetry. Esperanto is helping wonderfully the sciences, the commerce, the travelers.

Vidu kiel facile estas lerni Esperanton

La lingvo internacia Esperanto estas facile lernebla eĉ por la pernosoj ne multe instruitaj. Unu horo sufiĉas ĝenerale por lerni la tutan gramatikon, kelkaj tagoj por legi, kelkaj semajnoj por skribi, kelkaj monatoj por paroli. Esperanto estas efektive simpla, fleksebla, belsona kaj internacia en siaj elementoj; per malgranda kvanto da radikoj oni povas fari tre grandan nombron da vortoj dank' al la praktika sistemo de prefiksoj kaj sufiksoj. Tiu ĉi lingvo perfekte taŭgas por la internaciaj rilatoj, eĉ por la literaturo kaj poezio. Esperanto helpas mirinde la sciencojn, la komercon, la vojaĝistojn.

Sign up for an Esperanto course now! New evening classes for beginners and advanced students will begin September 19th. Special evening classes for teachers. Write or phone:

ESPERANTO INSTITUTE
OF AMERICA
1018 W. Lincoln Ave.
Phone: MITchell 5-8477

IF YOU EVER NEED MONEY

Se vi iam bezonas monon

FOR ANY REASON

Pro iu ajn kaŭzo

FOR PERSONAL OR BUSINESS NEEDS

Por personaj aŭ komercaj necesoj

COME TO US, AND YOUR WORRIES WILL BE OVER

Alvenu nin, kaj viaj zorgoj ĉesos

CITY LOAN CO.

(Urba Pruntoficejo)

710 N. Plankinton Ave.

Rm. (ĉambro) 715

Tel. DALy 8-1390

Branch office (Filio):

2214 N. 3rd St., 2nd floor (2-a etaĝo)

(Nur por loĝantoj de nia urbo kaj ŝtato)